



JEN - Bulteno

1-1969



J. E. N. -

B U L T E N O

1/1969

Redaktanto:
Robert Rothenmeyer

Senpaga por membroj
de JEN

Sendu materialon al:
Robert Rothenmeyer
73 Old South Street
Northampton, Mass. 01060

PRI LA KOVROPAGO :

Tiu ĉi bildo, prenita de kapfoto de programo kaj raporto por la pasintjara Pentekosta Internacia Ĉeestado, estis sendita al ni de Hans Michael Maitzen, prezidanto de Aŭstria Esperanto-Junularo, kun la jena priskribo:

" La bildo reprezentas la bazan elirsituacion de la nuna tempo koncerne la spiritan batalon. Maldekstre kiel reprezentanto de la (ankaŭ spirita) establumo universitata profesoro en mezepoka vestaĵo. Dekstre la reprezentanto de la ribela studentaro (Rudi Dutschke). Kaj meze tri grandaj grupoj de la socio trans kiu etendiĝas la tensio inter ambaŭ fortoj:

" La formale funkciigita amaso (armeo), la indiferenta, sed materiale funkciigita amaso (homoj aŭskultantaj elektkampanjan prelegon), kaj finfine la aktiva kaj kreiva parto de la popolo (studentoj en prelegejo). "

La nuna numero de JEN-Bulteno estas speciale dediĉita al la studentaj problemoj, tiel gravaj por nia socio en la nuna tempo, kaj por ni kiel gejunuloj kaj studentoj.

2.

LA KAUZO DE LA RIBELAJ STUDENTOJ

La ribeloj kiuj ekozegis ĉe multaj kolegioj lastprintempe havas sufiĉe pli da pravigo, ol oni eble komprenas laŭ gazetoj kaj televidaj rakontoj. Kelkaj komentistoj riproĉis malmultajn romantikajn t.n. Nov-Maldekstranojn kiuj ludas je revolucio, aŭ alie mallertajn ŝanceliĝemajn administrantojn; aŭ alie la malakordon pri Vjetnamio, aŭ alie la malprecizan epidemion de studenta maltrankvilo kiu ŝajnas disvastiĝi tra la mondo. Ĉiuj tiuj elementoj estas ingrediencoj de la kaldrono, certe, sed ili ne estas la ĉefaj ingrediencoj. Ili ne povus kaŭzi tian vastan sternan malordon krom se konsiderinda nombro da ordinaraj bonkondataj studentoj sentus profunde plendoplene. Kaj kun prava kialo.

Ja, kio ajn estas okazanta ĉe niaj kolegioj hodiaŭ ne estas nur forpasanta tumulto subigebla per pli firma disciplino. Nek temas pri revolucio. Male, mi kredas, ke ĝi estas la komenco de kontraŭrevolucio, ĝuste fare de studentoj pri la liberalaj artoj, kontraŭ trankvila, preskaŭ nerimarkita revolucio, kiu ŝanĝis la tutan strukturon de usona alta klereco en la daŭro de la lastaj du jardekoj. La ĉefaj profitantoj de tiu revolucio estis la profesoroj. La viktimoj estis la liberalartaj studentoj. Sed lastatempe tiuj studentoj komencis kompreni kiom ili estas viktimitaj -- kaj ilia protesto probable grandiĝos ĝis almenaŭ kelkaj rezultatoj de la pli frua revolucio estos forigitaj.

Dum la tumulto en la Universitato Columbia (Novjorko) -- kaj aliloke -- la tumultantoj estis preskaŭ neniam studentoj pri inĝenierado, medicino, juro, ĵurnalismo, kaj la fizikaj sciencoj. Tiuj kiuj barikadis oficejojn, prirabis la universitatestran oficejon, kaj bruligis la profesorajn manuskriptojn, estis, tipe, studentoj de la liberalaj artoj. Tio ne estas simpla koincido.

Kelkaj junuloj venas al universitato kun siaj vivplanoj jam aranĝitaj. Ili scias, ke ili deziras esti kuracistoj aŭ advokatoj aŭ profesoroj, kaj ili serĉas plenan instruon en sia elektita profesio. Grandparte ili estas bone servataj.

Aliaj junuloj (ofte la plej inteligentaj) envenas la unuajaran studentaron tute ne certaj kion fari en la vivoj. Ili venas al kolegio por "trovi sin" kaj fari takson de siaj kapabloj, kaj de la timiga komplika mondo preter la kolegiaj pordoj. Ili ne deziras preparadon por profesio -- almenaŭ ankoraŭ ne. Ili deziras ĉefe intelekton, kaj ili esperas trovi almenaŭ scieton per parolado al prudentaj, maturaj viroj; per legado sub la gvido de tiuj viroj; kaj per rimarkado kiel ĉi tiuj personoj kondukas sian vivon. Sume, ili serĉas tion kio antaŭe nomigis "liberala klereco." Eĉ antaŭ tiel mallonga periodo, kiel dudek jaroj, ili eble estus povintaj trovi ĝin en la plejparto de bonaj usonaj universitatoj. Hodiaŭ iliaj ŝancoj proksimas nulon.

Kiel Irving Kristol montris en la revuo Fortune pasintan majon, "En la grandega plimulto de universitatoj, liberala klereco estas estingita." Ĝin detruis la akademia revolucio. Multaj profesoroj kaj administrantoj tamen ne ŝajnas elkompreni, ke liberala klereco estas for. Almenaŭ en sia oficiala oratorado, ili sugestas, ke iliaj institucioj ankoraŭ liveras ĝin laŭ abunda, edifa kvanto. La unuajara studento, kiu altirigis al la universitato ĉar li traktis tiun retorikon serioze, rapide trovas, ke ĝi simple ne estas ĝusta. Tial liaj akuzoj pri hipokriteco, lia seniluziigo, kaj lia emo ĵeti brikojn tra lernĉambrajn fenestrojn. Li sentas, ke oni mensogis al li.

Kio mortigis liberalan klerecon? La plej bona raporto estis prezentita de Christopher Jencks kaj David Riesman en sia libro La Akademia

Revolucio. (Riesman estas profesoro de sociaj sciencoj en la Universitato Harvard; Jencks estas surloka asociito de la Instituto pri Planaj Studoj en Vaŝingtono.) La revolucio, kiun ili priskribas, naskiĝis, proksimume, ĉirkaŭ la fino de la Dua Mondmilito, kiam la postulo por alta instruado komencis kreski eksplode rapide. La solaj personoj, kiuj povis plenumi tiun postulon -- la universitataj instruistoj -- subite trovis sin en alte strategia pozicio. Nur antaŭ nelonge ili estis humilaj pedagogoj; nun ili estis la solaj provizantoj de malabunda kaj karega komercaĵo. Kiel ĉiuj monopolistoj, ili uzis tiun nova trovitan rajton por egigi sian riĉecon, sian prestiĝon, kaj sian aŭtoritaton. Hodiaŭ jaraj enspezoj de \$50,000 -- el salajroj, registaraj kaj fondaĵaj subvencioj, ekstraj lekcionoj, kaj konsultaj pagoj -- ne estas maloftaj en akademiaj medioj.

La profesoroj ankaŭ uzis sian novan reputacion por alproprigi grandan decidopovon for de la universitataj kuratoroj kaj prezidantoj. Ĉe la plejparto de kolegioj hodiaŭ, la profesoroj decidas kiuj instruistoj dungigis kaj maldungigis, kio estos instruata, kaj al kiu.

Per tia levpovo, la profesoroj baldaŭ komencis reformi la universitaton por taŭgigi ĝin al siaj deziroj; prefere ol al tiuj de la studentoj aŭ iliaj gepatroj. Unue, la instruistoj hodiaŭ instruas ĉiam malpli multe. Jencks kaj Riesman notas, ke "ĝis la Dua Mondmilito eĉ superaj kleruloj laboris je bazaj aferoj: instruante malgrandajn grupojn de malaltnivelaĵ studentoj, legante referatojn kaj ekzamenojn, kaj tiel plu. Hodiaŭ, tamen, malmulte da bone konataj kleruloj instruas dum pli ol ses horoj semajne. La rutinaj problemoj de amasa alta klerigo estas transdonataj, pro manko de aliaj, al magistras kaj doktoras studentoj."

Plue, la malofta instruado de la profesoroj ofte estas "enuiga kaj

senefika." Ili havas nenian stimulon por elserĉi ian ajn profesionan instruadon pri la arto de instruado, ĉar bona instruado estas "nenia helpo por ricevi pli altan salajron, transiri al pli prestiĝa kolegio, aŭ gajni la admiron de siaj kolegoj." Ĝi povas esti eĉ handikapo, ĉar "la kapabla instruisto trovas, ke studentoj eltretas vojeton al lia pordo kaj lasas malmulte da tempo por studado kaj esplorado" -- kaj la esplorado pagas mone kaj reputacie.

Efektive, la tipa profesoro ne povus zorgi malpli pri la interesoj de studentoj. La demandojn kiujn ili demandemas -- Kio estas la bona vivo? la naturo de la justeco? la kuracilo por la malbonoj de socio? -- la tipa profesoro rigardas kiel tedaĵon kaj embarason. Malmulte da profesoroj hodiaŭ pretendas havi solvojn de tiaj grandaj demandoj; ĉiu deklaras anstataŭe sian mallarĝan specialaĵon -- ekonometron, ekzemple, aŭ minorajn britajn poetojn de la 18-a jarcento.

Sekve, la studentoj kiuj atendas "videblan rilaton inter scio kaj agado, inter la demandoj de la lernĉambro kaj siaj vivoj ekster ĝi," ricevas anstataŭe "pedantecon kaj fremdigan klerecon" (Jencks kaj Riesman ree). Ĉu estas surprize, ke ili estas "komplete haltintaj" kaj konvinkiĝis ke "ĉiu sistema kaj disiplina intelekta klopodo estas malŝparo de tempo?"

Tiuj plendoj, ŝajnas al mi, estas la fundamenta kaŭzo de la kolegiaj ribeloj. Kiam studentoj postulas "studentan rajton," ili vere petas partan renverson de la akademia revolucio, kiu estingis liberalan klerecon. Ili protestas novan specon de universitato kiun tiu revolucio kreis -- universitaton kiu, laŭ la vortoj de Kristol, "estas tre bona por instrui al kleruloj kaj specialistoj" sed estas "tre malbona por eduki junajn gevirojn."

6.

Kion celas studentoj per la termino "studenta rajto"? Precize, ili deziras decidovoĉon rilate instrutemojn, por ke almenaŭ kelkaj kursoj rilatu al iliaj vivoj kaj interesoj, prefere ol al la universitatoj kaj la esploraj projektoj de la profesoroj. Ili ankaŭ deziras pli bonan instruadon, kaj esperas akiri ĝin per starigi ian procedon por rekompenci bonajn instruistojn kaj puni la malbonajn.

La ribelaj studentoj havas alian aron da plendoj -- relative malpli gravaj, kvankam ili estas ofte la preteksto de kolegiaj tumultoj kaj eĉ pli ofte aperas en la rubrikoj de ĵurnaloj. Ili rilatas la mastrumadon de la universitato: ĝiaj reguloj pri loĝejoj, nutraĵoj, virinoj, alkoholaĵoj, narkotaĵoj, kaj tiel plu.

Tiuj reguloj retrospektivas pli fruan epokon, kiam studentoj estis rigardataj kiel infanoj konfiditaj al la universitato por morala edukado. Por tiu celo gepatroj insistis, ke la kolegio servu kiel senĉesa ŝaperono. Nun la administrantoj timas nuligi siajn mastrumadajn regulojn, ĉar gepatroj kaj registaranoj (kiuj tenas la monujajn ŝnuretojn) eble suspektos, ke la universitato fariĝis nutrejo de malvirto. Sed la administrantoj scias, ke ili ne povas efike apliki ilin, kaj ordinare ŝajnas nur indiferece tiel agi.

Inteligenta solvo, kiun kelkaj pli aventuremaj akademiaj administrantoj komencas elkompreni, estas transdoni al la studentoj pli grandan parton de tiu respondeco. Kiam okazo estas donata al studentaj organizoj, ili ordinare traktas tiujn aferojn sufiĉe bone. Fakte, pri rutinaj disciplinaj aferoj, studentaj juĝejoj ofte estas pli rigoraj ol estus la estroj de la fakultatoj.

Kompreneble, gravaj pekoj kontraŭ leĝoj, kiel kolportado de narkotaĵoj, devus esti traktataj de urba kaj ŝtata polico. Kaj ribelaj per-

fortoj, kiel rabi kolegiajn oficejojn kaj bruligi profesorajn manuskriptojn, evidente devus esti subigataj rapide kaj decide per tiom da polica potenco, kiom necesas. Perfortoj eble iĝus malpli oftaj, tamen, se oni donus al studentoj administrajn respondecojn; tio eble ankaŭ estus la plej rapida rimedo por instrui maturan respondecon.

Plue, se la administracio kaj profesoroj povus sin liberigi de la plejparto de siaj nunaj malmodernaj funkcioj, ili povus poste disponigi pli da tempo por solvi sian grandan problemon : kiel rekonstrui la universitaton por igi ĝin denove centro de liberala klereco, prefere ol nura preparejo por profesiaj specialistoj. Ĝis ili solvos tion, ili havos neniun pacon.

(tradukis: Steve Berger)

LINGVO-PROBLEMOJ INTER SIMIOJ

Simioj ankaŭ suferas pro lingvo-diverseco. Laŭ artikolo en la decembra numero de "Science Digest," mankas al malsamaj simiaj specoj komuna lingvo. Kvankam simioj ne havas parolatan lingvon kiel homoj, ili uzas gestojn, minac-simbolojn, ktp. Tiu ĉi lingvo estas unika por ĉiu speco. Kiam diversaj simioj estas tenataj en unu kaĝo, estas daŭra luktado pro mistraduko de simi-signaloj. Post kelke da monatoj, ili lernas la lingvon de la aliaj. Post certa tempo, simio povas kompreni aliajn lingvojn, sed povas paroli nur la propran.

Instruisto: "Hodiaŭ ni lernos pri la angla reĝo Rikardo la Leonkora."
Lernanto: "Sinjoro profesoro, kiu kuracisto transplantis la koron?"

8.

ESPERANTO KAJ LA INTERNACIA P.E.N.

Erik Felker.

Por diskonigi niajn internacian lingvon kaj internacian literaturon, mi sugestas ke la Universala Esperanto-Asocio aliĝu al la Internacia PEN (asocio de poetoj, redaktistoj kaj romanistoj). Tio estas, ke la eminentaj verkistoj de la tutmonda Esperanto-movado, eble kun la kunhelpo de la literaturaj/belartaj delegitoj, starigu literaturan grupon (Esperanto-fakon de PEN) kiel havas preskaŭ ĉiuj nacioj. Ĉi tiu grupo estiĝus ano de la Internacia PEN, kun tial la okazo esprimi siajn literaturajn kaj lingvosciencajn opiniojn, kiel ankaŭ diskonigi la originalan literaturon de la Esperanto-movado en neŭtrala medio.

Mi kredas, ke se la Universala Esperanto-Asocio volas partopreni en tiu ĉi grava grupo, estas almenaŭ tri logikaj "defendoj" de la pozicio:

1. Kvankam PEN organiziĝis laŭ nacia membreco, ŝajnas konvene, ke PEN, kiu estas neŭtrala, internacia organizo, akceptu en sian membraron, neŭtralan, internacian lingvon, al kiu, se ĝi estas sen nacia hejmo, certe ne mankas aŭ parolantoj aŭ literaturo.
2. Esperanto estas perilo por disponebligi literaturverkojn tra la tuta mondo per unuobla traduko.
3. Tiu sugesto harmonias kun la volo de la Internacia PEN emfazigi la supernacian aspekton de la literaturo.

La rilatoj de la E-movado kun PEN estas nun pli-malpli bonaj. Se grupo de samideanoj volus revivigi la malnovan Internacian Verkistan Asocion (aŭ starigi novan organizon), ili prave povus fari valoran kontribuon al la E-movado kaj al la monda literaturo. Almenaŭ ni diskutu la ideon! Viajn sugestojn kaj esprimojn de konsento sendu al la Redaktanto aŭ al: Erik Felker, 731 Birmingham Road, Burbank, Calif. 91504.

La Reĝo de Umo


Mi iam demandas min ĉu estas sur la steloj inteligentaj estaĵoj




Kompreneble: rusoj, usonanoj, kaj similaj



Kaj iam mi min demandas ĉu ili parolas nian belsonegan novegan sciencpleneĝan...




... grandiozeĝan verdeĝan ideĝan literatureĝan neŭtraleĝan...




mirindeĝan bonverkeĝan zamenhofeĝan lingveĝan?



Ne. Ili parolas la anglan.



Mi MIN demandis!



BRAG.

ESPERANTISTO DE LA MONATO

JEN-INTERVJUO: Arthur Morse

interparolo kun juna Esperanto-parolanto

Arthur Morse, kies nomon ĉiu JEN-membro rekonos, estis estrarano de JEN ĝis pasinta septembro. La naskiĝis kaj pasigis la tutan vivon en Millers Falls, Massachusetts, kie li nun loĝas.

JEN: Kiel vi eksciis pri la ekzisto de Esperanto?

Morse: Kiam mi estis en la naŭa klaso, iu samkursanino malsaniĝis kaj, ne vizitante la lernejon, ŝi eklernis Esperanton. Post sia reveno, ŝi interesis aliajn pri la lingvo, inkluzive min. Mi studis la etan lernolibron de Butler kaj post du semajnoj mi parolis Esperanton. Nun, rigardante leterojn, kiujn mi skribis tiam, mi konstatas, ke mia tiama stilo havis grandajn mankojn. Mi kaj la grupo kiu lernis Esperanton en la lernejo komencis klubon kiu daŭris kelke da jaroj. Ni ofte kunvenis en mia domo kun iuj plenaj Esperantistoj el la regiono.

JEN: Kion vi faris en JEN?

Morse: Mi aliĝis al JEN en 1964, nelonge post ĝis kreigo. Mi estis, tra iuj jaroj, reprezentanto al JEN por Okcidenta Massachusetts. Mi fariĝis estrarano en 1967, la zenito de mia laboro kun JEN. Nun mi estas enpoŝtiganto de la presadoj kaj resendanto.

JEN: Kial vi cedis vian estraran rolon en JEN?

Morse: Neniun komenton.

10.

JEN: Kion vi faris per kaj kun Esperanto?

Morse: Mi verkis kelkajn diversajn artikolojn kaj poemojn por la malnova JEN-Bulteno. Mi eĉ eldonis unu numeron, kiun mi preferas forgesi. Surprize al mi, mi kontribuis ion al la nova JEN-Bulteno, ankaŭ.

JEN: Kial vi lernis Esperanton?

Morse: Ĝi estis por mi iel simila al "pork-latino" ĉar ĝi estis ĝojiga. Mi certe ne lernis ĝin pro altruismaj kialoj.

JEN: Kion vi opinias pri la unua numero de la nova JEN-Bulteno?

Morse: Mi nur enpoŝtigis ĝin, mi ne legis ĝin.

JEN: Kio alia interesas vin?

Morse: Mi kolektas rokojn, monerojn, kaj fosiliojn. Mi ankaŭ kolektas maloftajn malnovajn botelojn, precipe per serĉado de rubejoj.

JEN: Jeĥ! Ni ŝangu la temon. Kio okupas vin nun?

Morse: Nun mi estas komizo por firmo en Greenfield kie mi funkciigas la teletajpilon, enpoŝtigas reklamfoliojn, kaj faras diversajn taskojn. Mi intencas fini la lastan jaron de mia universitata eduko post kiam mi gajnis sufiĉan monon.

JEN: Kion vi gajnis per Esperanto kaj viaj spertoj en JEN?

Morse: Mi fariĝis streĉita ruinulo.

ĈU VI ESTAS VERA INTERNACIISTO ?Humphrey Tonkin

Universala Esperanto-Asocio fondiĝis en 1908 -- kelkajn jarojn antaŭ ol ni naskiĝis.... Oni kreis ĝin por servi kiel ponto inter la diversaj naciaj Esperanto-organizaĵoj, kaj por gvidi je internacia skalo nian internacian movadon.

La historio de Universala Esperanto-Asocio estis longa kaj tempesta. Skuis ĝin ne nur du mondmilitoj, sed ankaŭ internaj problemoj en la tri-dekaj jaroj, kaj ĉiamaj organizaĵaj kaj financaj problemoj.

Tamen, hodiaŭ UEA estas la plej larĝa kaj granda internacia Esperanto-organizaĵo en la mondo. Ĝi kunigas 30.000 personojn, 30 naciajn asociojn, kaj plurajn fakajn organizaĵojn, en unu grandan federacion; ĝi eldonas la plej multnombro eldonatan pure Esperantan gazeton; ĝi aperigas jarlibron, kiu estas la plej facile konsultebla ĉiujara gvidilo tra la Esperanto-movado; ĝi organizas ĉiujare la plej abunde ĉeestatan Esperanto-kongreson.

Por la junularo, la plej grava evento en la historio de UEA estis la formiĝo de ĝia junulara sekcio, Tutmonda Esperantista Junulara Organizaĵo, en 1956-57. Hodiaŭ TEJO havas proksimume 10.000 membrojn, 22 landajn sekciojn, kaj vastan agadon plenumatan preskaŭ ekskluzive de volontuloj. TEJO eldonas sian propran revuon, "Kontakto", kiu aperas kvaronjare; ĝi organizas ĉiujaran kongreson; ĝi aktive laboras inter neesperantistaj junularaj organizaĵoj, inter lernejoj, inter studentoj, en landoj kie ne ekzistas organizita Esperanto-movado, kaj en landoj kie esperantistoj abundas. Ĝiaj programoj kovras kulturon, trejnadon, regionan kunlaboron. La konata Esperanto-gazeto "Heroldo" nomis TEJO-n "eble la plej efike laboranta esperantista organizaĵo."

La usona Esperanto-organizaĵo ELNA estas landa asocio aliĝinta al UEA.

Kaj JEN estas landa sekcio de TEJO. Tamen, en Usono oni emas konsideri UEA kaj TEJO iom fremdaj organizoj. Tio estas erara: sen tiuj internaciaj organizoj, la laboro de unuopaj Esperanto-parolantoj je loka kaj nacia niveloj apenaŭ havus sencon.

Kion vi povas fari por plifaciligi la vastan, multekostan laboron de UEA kaj TEJO? Kompreneble, vi ĉiam povas donaci al ili monon: ili ja bezonas ĝin. Sed mono, kvankam valora, profitigas nur unu flankon -- la ricevanton. Pli bona estas alia ebleco, nome membriĝo. Se vi fariĝas individua membro de UEA kaj TEJO, vi ne nur kontribuas al la vivrimedoj de tiuj organizoj, sed vi ricevas edukajn kaj interesajn eldonaĵojn.

Personoj ĝis 21-jaraj povas aliĝi al UEA kaj TEJO kontraŭ unu kombinita kotizo de \$5.60. Personoj ĝis 25-jaraj povas aliĝi kontraŭ unu kotizo de \$7.50. Kontraŭ tiu sumo, ili ricevos tri ĉefajn eldonaĵojn: (1) la Jarlibro de UEA, kiu aperas en du partoj, kun pli ol 500 paĝoj, kaj enhavas grandan adresaron de ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj kaj lokaj reprezentantoj de UEA (entute proks. 4500 adresoj), plus librolisto, plus listo de Esperanto-gazetoj kaj radiostacioj, plus pluraj aliaj utilaĵoj, inkluzive jaran raporton pri UEA kaj ĝiaj diversaj aliĝintaj organizoj; (2) la monata revuo "Esperanto," kies paĝoj enhavas artikolojn de ĝenerala intereso, novaĵojn, recenzojn, raportojn pri kongresoj, ktp; (3) la kvaronjara revuo "Kontakto," kies riĉe ilustrita enhavo respegulas la interesojn, plezurojn kaj plendojn de la internacia junularo, kaj kiu ne pritraktas Esperanto-aĵerojn mem.

Kion fari se vi estas pli ol 25-jara? Ne ploru: ankaŭ por vi ekzistas eblecoj aliĝi al UEA. La jarkotizo estas \$7.50, kontraŭ kiu vi ricevas la Jarlibron kaj la revuon "Esperanto." Por plenaĝuloj "Kontakto" estas abonebla kontraŭ du ekstraj dolaroj. Cetere, se plenaĝuloj

deziras aparte helpi al TEJO, ili povas tion fari per Patrona Membreco, kiu kostas \$4.50 kaj kiu inkluzivas ne nur abonon al "Kontakto" sed ankaŭ tempaltempan ricevadon de aliaj eldonaĵoj de TEJO (kiuj inkluzivas internan organizan bultenon, kaj nacilingvajn informbultenojn).

Usonaj pagantoj povas sendi siajn ĉekojn al la ĉefdelegito de UEA en Usono, s-ro D.E. Parrish, 328 West 46th street, Los Angeles, Calif. 90037, aŭ al estrarano de JEN, Humphrey Tonkin, 2131 Tryon Street, Philadelphia, Pa. 19146.

--- ---

(pagita anonco)

FERIO KUN SENCO. Ekkonu danan filozofion kaj danan ferian vivon. Pasigu la antaŭkongresan semajnon (19-26 julio 1969) en la feria centro KOSMOS en Danlando. Prelegoj kaj liberaj diskutoj pri esencaj demandoj de la vivo, i.a. pri esperanto-problemoj. Feriado en bela dana naturo apud la maro. Ekskursoj al vidindaĵoj kaj historiaj lokoj. Vizitoj en danaj feriaj hejmoj, kie floras intereso pri humanismaj kaj internaciaj demandoj. Petu senpagan broŝuron ĉe Martinus-Instituto, Esperanto-Sekcio, Mariendalsvej 94-96, DK 2000 Kopenhago F, Danlando.

--- ---

NOTU BONE !! Se vi ne realiĝis al JEN en 1969, tiu ĉi estos la lasta numero de la nova JEN-Bulteno kiun vi ricevos. Realiĝu tuj !

Antaŭ kelkaj tagoj mia patro ricevis komercan leteron el Hispanujo. La letero estis skribita en komprenebla sed neperfekta angla. Ĝi komenciĝis: "We are glad seeing your offer appeared in..." Iomete pli sube sur la paĝo estis la jena paragrafo: "Kindly forward details offer of goods plus specifications and samples of same. One of our many clients may be interested, in principle." Necesas la unua frazo por kompreni la duan; sed tre verŝajne la skribinto ne sciis, ke tiu lasta frazo tuj ridigos anglaparolantojn. Je la fino de la letero oni skribis: "We are banking with..." Klare, la skribinto sciis, ke tre ofte, kiam la Hispana uzas simplan verbon, la angla postulas helpverbon (el to be) kaj la gerundian formon (-ing). Tamen, ankaŭ tre klare, tiu komercisto neniam lernis la uzadon de la angla verbo; kaj tia uzado estas tre malfacila al fremdulo. Oni povus ekhavi la ideon, ke la firmo uzas specifan bankon hodiaŭ -- mur.

Sed kiam mi demandis al mia patro, ĉu la neperfekta gramatiko malhelpas la internacian komercon, li respondis, ke ne. La perfekteco, li klarigis, donas la impreson, ke la ricevanto havos sian kontakton per peranto--tradukisto. Aliflanke, la neperfekto donas la impreson, ke la ricevanto havos rektan kontakton kun la komercisto mem. Eĉ se tiu ne estus efektiva, la impresoj, la ideo, restas kaj gravas. Cetere, ni ne forgesu, ke tia letero ja estas tute komprenebla (al mia patro almenaŭ). Sed la demando restas: Ĉu efektive estas interlingvistika problemo en la komerco? Ĉu la nesparteco (eĉ post pluraj jaroj da studado) ja kostas -- finance, tempodaŭre, alie? Aŭ ĉu, laŭ la opinio de mia patro, la nesparteco ja helpas? Kaj se jes, kial la komerco bezonus Esperanton?

MALLONGAJ INFORMOJ

Fondaĵo por Esperantologiaj Studoj. La "Esperantic (jes, esperantic) Studies Foundation, antaŭnelonge fondita, celas stimuli instruadon kaj esploron pri Esperanto, inkluzive la kulturon de ĝia parolantaro. Esperanto, ĝis nun, ne ricevis sufiĉan atenton de esploristoj en Usono. La fondaĵo ankaŭ traktos la uzojn de Esperanto en la diversaj agadkampoj dum la pasintaj okdek jaroj. La fondintoj estas E. James Lieberman, psikiatro, Humphrey Tonkin, profesoro kaj JEN-estrarano, kaj Jonathan Pool, studento kaj ankaŭ JEN-estrarano. Sendu komunikaĵojn al: d-ro E. James Lieberman, 6451 Barnaby Street N.W., Washington, D.C. 20015. Listo de esplortemoj kaj bibliografio estas haveblaj.

"Literatura Kajero." Tiu ĉi nova gazeto havas duoblan celon, nome provizi la legemajn esperantistojn per abunda kaj varia legomaterialo, kaj stimuli la esperantistojn al la tradukado, donante al ili la eblon publikigi siajn tradukojn. Kompreneble ĉi tiu gazeto ne okupos sin per esperantistaj demandoj - por tio jam ekzistas bonegaj internaciaj kaj naciaj gazetoj - nek pri lingvaj diskutoj. Ĝian enhavon konsistigos precipe tradukita prozo - kuriozaĵoj, anekdotoj, rakontoj, romanoj, dramoj - kvankam ankaŭ poemoj trovos lokon en ĝi. La redaktanto petas, ke tradukemaj usonanoj ekkonu la "Literaturan Kajeron" kaj kontribuu al ĝi. Redaktanto kaj administranto: Henerik Kocher, Rua Baltasar Lisboa, 34 (ZC-11) Rio de Janeiro, Brazilo. Jarabonon (\$3) oni povas pagi per la usona peranto, Humphrey Tonkin, 2131 Tryon Street, Philadelphia, Pa. 19146.

Forĵetaĵufabrikistido! Se vi komprenis tiun vorton, vi estas verŝajne taŭga labori kiel instruanto de la Internacia Koresponda Kurso pri Esperanto, estrata de la Societo pri la Internacia Lingvo de la Universitato de Chicago. La postenoj estas salajrataj! Skribu al: International Language Society, 1212 East 59th Street, Chicago IL 60637.

JUNULARO ESPERANTISTA DE NORDAMERIKO (JEN)
4 Central Street, Millers Falls, Mass. 01349, Usono

Estraro 1968/69: Peter Benson, Jonathan Pool, Humphrey Tonkin, Julie Tonkin
Membrokotizoj: \$2.00 por membroj (ĝis 30-jaraj) kaj subtenantoj
\$1.00 por novaj membroj.

Membroj ricevas: La dumonatan anglalingvan News Digest, la JEN-Bultenon,
kaj Asocian Membrecon de Tutmonda Esperantista Junulara
Organizo (TEJO), la junulara sekcio de Universala
Esperanto-Asocio.

Kotizojn sendu al: La ĉi-supra adreso de JEN.

Redaktoro de News Digest: Jonathan Pool, 5238 South Kenwood, Apt. 1,
Chicago IL 60615.

Sekretario de JEN: Julie Tonkin, 2131 Tryon Street, Philadelphia, Pa. 19146

Redaktoro de JEN-Bulteno: Robert Rothenmeyer, 73 Old South Street,
Northampton, Mass. 01060

Kotizojn por TEJO sendu al: Humphrey Tonkin, 2131 Tryon Street, Philadelphia,
Pa. 19146 (personoj ĝis 21-jaraj: \$5.60; personoj 21-25-
jaraj: \$7.50)

Adresojn por Daŭrinform sendu al: Darla Benson, 23 Mardrew Road, Baltimore
MD 21229 (Daŭrinform estas servo, kiu liveras al interes-
atoj senpagan abonon de News Digest dum limigita periodo,
cele al ilia varbado).

Koresponda Servo de JEN: Ellen Lewis, 15 Salisbury Road, Brookline, Mass.
02146.

Esperanto-redaktoroj, JEN volonte interŝanĝas siajn eldonaĵojn.

Legantoj de la JEN-Bulteno, se vi ne ŝatas tiun aŭ alian esprimitan opinion,
se vi volas esprimi vian opinion, se vi volas plendi aŭ
laŭdi aŭ konsenti, skribu Leteron al la Redaktoro!

4
-
8

4
-
8

JEN
4 Central Street
Millers Falls, Mass. 01349

Return Requested
Address Correction Requested

DATED MATERIAL

Non-Profit Organization U. S. POSTAGE PAID PERMIT NO. 5 MILLERS FALLS, MASS. 01349
--